
ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 7-9/2019

Julio-Septembro 2019

JARKOLEKTO 116 - N. 1176-1178 - Julio/Septembro 2019

**_Sur la kovrilo:_** Medjugorje - la plej konata kaj vizitata pilgrimloko en Hercegovino

## ENHAVO

LA 30-A INTERNACIA FESTIVALO DE LA JUNULARO MLADIFEST EN MEDJUGORJE, BOSNIO 35

Robert kardinalo Sarah: NI ESTU KONSTRUANTOJ DE LA KATEDRALO 36

I.K.U.E. DUM LA 104-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZINTA EN LAHTIO, FINNLANDO 40

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA KONGRESIS ĈE LA LAGO BALATONO EN HUNGARIO 41

LA SANKTA MESO OKAZE DE LA 86-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO 42

LA OKULTISMO REVENAS PLI FORTA OL ANTAŬE 43

Abbé René Laurentin: OFENSIVO DE SATANO 44

Sankta Seĝo: GENDER-IDEOLOGIO POR LA HOMARO SIGNIFAS PAŜON RETURNEN 46

PRO ĈIO ĈI KULPAS VI, MALJUNULINO... 47

HO DIPATRINO (kanto) 48

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA 30-A INTERNACIA FESTIVALO DE LA JUNULARO MLADIFEST EN MEDJUGORJE, HERCEGOVINO



La 30-a tradicia festivalo de la junularo Mladifest okazis de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2019 en la fama Maria-pilgrimloko Medjugorje en Hercegovino. La nunjaran festivalon partoprenis ankaŭ la oficiala delegacio de la Apostola Seĝo. Inter ĉirkaŭ 50 mil junaj pilgrimantoj, inkluzive de kvarcent sacerdotoj, estis ankaŭ la ĝenerala vikario de la Sankta Patro por la urbo Romo, la kardinalo Angelo de Donatis, la prezidanto de la Papa Konsilio por la nova evangelizado, Mons. Rino Fisicella, la sekretario de la Kongregacio por la konsekrita vivo, mons. Jose Rodriguez Carballo, la apostola nuncio de Bosnio kaj Hercegovino, Mons. Luigi Pezzuto kaj kompreneble la konstanta vizitacianto de la paroĥo Medjugorje, Mons. Henryk Hoser. Sian ĉeeston anoncis ankaŭ Mons. Dominique Rey, episkopo de la franca Toulon, Mons. Giampaolo Crepaldi, episkopo de la itala Terst, Mons. Vlado Košić, episkopo de la kroata diocezo Sisak kaj la sarajeva ĉefepiskopo kardinalo Vinko Puljić.

La programo de la festivalo estis konsistita el katekizadoj, atestadoj, adoradoj kaj procesioj. En la interparolo ĝin por la Vatikana Radio proksimigis la vizitacianto de la paroĥo Medjugorje, Mons. Henryk Hoser. La nunjara ĝia moto estas transprenita el la evangelio de la sankta Marko (10,21): „Venu kaj sekvu min!“ Laŭ la pola ĉefepiskopo Mons. Hoser estas por la gejunuloj tre grave havi proksime aŭtoritaton, absolutan aŭtoritaton, kiu montras certan vojon al la vero.

„Medjugorje estas loko, kie gejunuloj – sed ne nur ili – trovas vojon, kondukantan al Dio, denove ili trovas perditan aŭ forgesitan rilaton al Dio. La konvertiĝo, kiu estas centro de la spiritualeco de Medjugorje ebligas malkovri, ke Dio estas nia Patro kaj ni estas liaj infanoj. Tiu ĉi ligo ekzistas tial, por ke ni plene travivadu, ke ni estas la bildo de Dio.“

Kial tiu ĉi balkana loko allogas tiom da homoj?


„Tiu ĉi loko estas agnoskata. Nunjare ĉi tie okazas la trideka festivalo, kiu havas sian specifan famon. Junaj homoj volonte venadas ĉi tien travivante ĉi tie intensajn momentojn. Ekestis ĉi tie ia tradicio, kiu transdoniĝas de generacio al generacio. En Medjugorje ni disvolvas honoron al Madono, kiu estas kultata kiel la Reĝino de la Paco, de la paco en la homa koro, de la familia eĉ socia paco. Kaj tio estas grava por la tuta Balkano, kiu travivis teruregan, fratmurdecan militon. Nun bezonas pacon ankaŭ nia koro. Mi kredas, ke tiu ĉi mesaĝo de Medjugorje trovos resonon en la koroj de la gejunuloj“, diris la apostola vizitacianto de Medjugorje, la pola ĉefepiskopo Mons. Henryk Hoser. ■

*Vatican News, 1.8.2019*

# Robert kardinalo Sarah: NI ESTU KONSTRUANTOJ DE LA KATEDRALO

***La sekvan alparolon prezentis prefekto de la Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj, Lia Eminenco Roberto kardinalo Sarah en la preĝejo de la sankta Francisko Ksavera en Parizo la 25-an de majo 2019 nur kelkajn horojn post sia vizito de la katedralo Notre Dame. Jen ĝia unua grava parto.***

Karaj geamikoj, unue permesu al mi danki al Monsinjoro Michel Aupetit, la ĉefepiskopo de Parizo, kaj al la sacerdoto de la paroĥo de la sankta Francisko Ksavero, al la patro Lefèvre-Pontalis, pro ilia frateca akcepto.



Mi venis prezenti mian lastan libron: *The Day is Far Spent* (La tago proksimiĝas al vespero). En la libro mi analizas profundan krizon de Okcidento, la krizon de la kredo, la krizon de la Eklezio, sacerdoteco, identeco, la krizon de la senco de la homa vivo. Mi en ĝi priskribas tiun ĉi spiritan degeneron kaj ĉiujn ĝiajn sekvojn.

Ĉi-vespere mi volas rediri la faktojn, pri kiuj mi estas profunde konvinkita, en kunteksto de mia hieraŭa emociplena vizito. Nur antaŭ kelkaj horoj mi vizitis katedralon Notre-Dame en Parizo. Post kiam mi eniris bruligitan katedralon meditante pri ĝiaj ruinigitaj volboj, mi povis nenion alian en tio vidi ol simbolon de la nuntempa situacio de la okcidenta civilizacio kaj la Eklezio en Eŭropo.

Estas tio malĝoja fakto: hodiaŭ havas la katedralo interne bruligitajn ĉiujn murojn. Ni vidas ĝin damaĝitan per ankoraŭ pli pereiga incendio, ol tiu, kiu ĝin bruldamaĝis. Kio estas tiu fajro? Ni devas havi kuraĝon ĝin nomi, ĉar „nomi la aferojn malbone signifas ankoraŭ pli grandigi mizeron de tiu ĉi mondo“.

Tiu ĉi flamo, tiu ĉi incendio furiozanta precipe en la Eklezio en Eŭropo rilatas la intelektan, kredinstruan kaj moralan ĥaoson. Estas tio nia malbrava rifuzado heroldadi la veron pri Dio kaj homo, protekti kaj transdonadi moralajn kaj etikajn valorojn de la kristana tradicio. Estas tio nia perdo de la kredo kaj ĝia spirito, la perdo de la objektiva rigardo al la kredo, kaj do la perdo de la ekkono de Dio. Kiel Johano Paŭlo la Dua skribis en *Evangelium Vitae*: „Dum serĉado de pli profundaj radikoj de la lukto inter la »kulturo de la vivo« kaj »kulturo de la morto« ... ni devas tuŝi propran senteman punkton, la kernon de tiel terura stato, kiun spertas homo de la nuna erao“ estas tio *perdo de la rilato al Dio kaj eĉ al la homo,* kiu estas propra al la sociala kaj kultura opinio reganta fare de sekularismo. Ĝi per siaj embuskoj kaj tentoj senĉese atakas ankaŭ la kristanajn komunumojn. Tiu, kiu lasas sin per ĝi trafi, facile estas infektita per viruso de la neelirebla cirklo: ĉar tiu, kiu perdas la rilaton al Dio, *perdas ankaŭ rilaton al homo*, al lia digneco kaj lia vivo. Kaj sekve la malobeado de la morala leĝo en tiel grava afero, kiu estas konservo de la vivo kaj ĝia digneco, kaŭzas, ke sinsekve malheliĝas ankaŭ la ebleco percepti vivigantan kaj savan ĉeestadon de Dio.“(1)

Karaj geamikoj, la katedralo Notre-Dame havis turon, kiu al ni kiel levita fingro al ĉielo montradis al Dio. En la koro de Parizo tiel ĝi alparoladis ĉiun homon pri la lasta senco de la homa vivo.

Tiu ĉi turo fakte estis simbolo de la unu-nura senco de la ekzisto de la Eklezio: gvidi nin al Dio, direktigi nin al Li. La Eklezio, kiu ne montras al Dio, estas la eklezio, kiu ruiniĝas kaj agonias. La turo de la pariza katedralo estas for kaj tio ne estas hazardo! Notre-Dame en Parizo estas simbolo de la tuta Okcidento, kiu krakas kaj dispecetiĝas post tio, kiam ĝi forturnis sin de Dio. Ĝi estas simbolo de la granda tento de la kristanoj en Okcidento: ne plu esti turniĝantaj al Dio, sed turniĝantaj al si mem kaj pereiĝantaj.

Mi estas konvinkita, ke tiu ĉi civilizacio troviĝas en sia agonio. Kiel iam ĉe dekadenco kaj falo de Romo, tiel ankaŭ la nuntempa elito zorgas pri nenio alia ol pri bonfarto de sia ĉiutaga vivo kaj homoj estas indiferentiĝitaj per ankoraŭ pli malmoralaj distraĵoj.


Mia devo kiel de episkopo estas averti Okcidenton: Rigardu la flamojn de barbareco, kiuj vin pereigas! Kaj kiuj estas tiuj barbaroj? Barbaroj estas tiuj, kiuj malamas la homan naturecon. Barbaroj estas tiuj, kiuj piedpremas, kio estas sankta. Barbaroj estas tiuj, kiuj malrespektas kaj manipulas la homan vivon vokante pri „la homa progreso“!

Kiam estas ŝtato preparita lasi malfortulojn kaj senpovulojn morti per malsato kaj soifo, ĝi ekiras vojon de barabareco! La tuta mondo observas, kiel Francio hezitas plu vivtenadi Vincent Lambert, unu el siaj plej malfortaj civitanoj. Miaj karaj geamikoj, kiel poste povas via lando instrui mondon, kio estas civilizacio? Se la ŝtato alproprigas al si rajton de la vivo kaj la morto por tiuj plej malgrandaj kaj plej malfortaj, se la ŝtato mortigas nenaskitajn infanojn en sino de iliaj patrinoj, ĝi estas ekirinta al barbareco!

La Okcidento estas blindigita per sia avido de riĉeco! Allogo de mono, kiun liberalismo enmetas en koron de homo, dormigas honojn! Kaj intertempe la senbrua tragedio de la abortigoj daŭrigas. Samtempe pornografio kaj gender-ideologio deformas kaj pereigas la infanajn kaj adoleskajn vivojn. Ni alkutimiĝis al barbareco kaj ĝi ne plu nin surprizas!

Sub surfaco de sia elstara rezulto en scienco kaj teknologio kaj la ekonomia prospero estas la okcidenta civilizacio en grava stadio de degenero kaj ruiniĝo! Ĝi ruiniĝas kiel katedralo Notre-Dame. Ĝi perdis kaŭzon de sia ekzistado: donadi direkton kaj gvidi ceterajn al Dio. Se la turo, kiu estas krono de la konstruaĵo, ruiniĝas, ĉu estas surprize, ke la volboj sub ĝi falas?

Mi volas laŭte frapi por alarmo, kiu samtempe estas ekĝemo de amo kaj kompato al Eŭropo kaj Okcidento: la Okcidento, kiu rifuzas sian kredon, historion, kristanajn radikojn, estas antaŭdestinita al primoko kaj morto. Ne plu ĝi memorigas belegan katedralon bazitan sur kredo, sed paralizitan ruinon!



Ĉiu homa civilizacio, kiu perdas rigardon al Dio, subfosas siajn proprajn fundamentojn. La katedralo per sia vertikala arkitekturo heroldas, ke ni estas kreitaj por Dio. Male la homo disigita de Dio estas malriĉigita nur por la horizontala nivelo.

Se Dio perdas sian centralan kaj primaran lokon, la homo perdas sian propran lokon, li ne plu trovas sian lokon en kreitaro, en rilatoj kun aliuloj. La moderna rifuzo de Dio nin malliberigas en novan formon de totaleco:

en relativismon, kiu ne allasas alian leĝon ol leĝon de profito. Ni devas rompi ĉenojn, per kiuj nin tiu ĉi nova totaleco volas katenigi! Se homo rifuzas Dion kaj sin apartigas de Li, tiel li estas kiel larĝa kaj granda rivero disigita de sia fonto, kiu pli frue aŭ pli poste sekiĝas kaj neniiĝas. Se homo rifuzas Dion, li estas kvazaŭ arbego, kiu estas dispartigita de siaj radikoj: baldaŭ ĝi pereiĝas. Nikolaj Berdjajev diras:

„Se ne ekzistas Dio, eĉ homo ne ekzistas: tio estas tio, kion ni per sperto ellernis. Aŭ ni rigardu veran naturecon de socialismo, kiam ni nun povas vidi, kiel ĝi fakte aspektas. Sed la vero, kiu vidiĝas kaj povas esti klare distingita, estas tia, ke ĉi tie ne povas esti religia neŭtraleco aŭ neĉeesto de religio: al la religio de la viva Dio starigas sin en opozicion kulto de Satano, ekzistas ĉi tie kredo je Kristo eĉ je Antikristo. Neŭtrala humanisma regado, kiu volas estiĝi, por ke ĝi estu peranto inter ĉielo kaj infero, estas stato de neniiĝo kaj tiuj du abismoj, alteco super ni kaj profundeco sub ni estas malkovritaj. Ĉi tie sin kontraŭ Dio-Homo ostentas ne la neŭtrala homo kiel peranto, sed homo-dio, la homo, kiu sin starigis sur lokon de Dio. La kontraŭpolusoj de Estado kaj neestado estas evidentaj kaj klaraj.“(2)

Rifuzi al Dio eblon eniri ĉiujn aspektojn de la homa vivo signifas, ke la homo sin kondamnas al soleco. Li fariĝas nenio alia ol soleca homo sen deveno kaj celo. Li estas kondamnita vagadi tra la mondo kiel migranta barbaro sen konscio, ke li estas filo kaj heredanto de la Patro, kiu lin pro la amo kreis kaj vokas lin, por dividi kun Li eternan ĝojon.

Rigardu ni la modernan homon: soleca, vaganta tra tero de ruinaĵoj. Tion ĉi mi konsciiĝis dum mia vizito de Notre-Dame, kiu estas detruita.

La spirita krizo, kiun mi priskribas, koncernas la tutan mondon. Sed sian devenon ĝi havas en Eŭropo. Rifuzo de Dio ekestis en mensoj en Okcidento. La nuntempa spirita katastrofo havas do klarajn okcidentajn trajtojn. Precipe mi volas emfazi rifuzon de patreco. Niaj samtempuloj estas konvinkitaj, ke esti libera signifas esti de neniu dependanta. Sed en tio estas tragika eraro. La okcidentaj homoj estas konvinkitaj, ke akcepti patrecon malakordas kun digneco de la homo. Sed la civilizita homo estas per sia natureco heredanto, akceptanta historion, kulturon, lingvon, nomon, familion. Per tio li diferenciĝas disde la barbaro. La rifuzo de nia enviciĝo en tiujn radikojn de dependeco, heredo kaj fileco nin kondamnas reiri kun nudeco en praarbaron, kaj resti en ĝi kiel viktimo de ekonomio de pli forta, kiu en ĝi regas.



La senso por dependeco kaj transportado de valoroj estis profunde engravuritaj en la korojn de tiuj, kiuj konstruis Notre-Dame. Ili laboris dekjarojn kaj centjarojn por siaj posteuloj kaj en multaj kazoj sen vidi finon de sia verko. Ili sciis, ke ili estas heredantoj volante transdoni pluen sian heredaĵon.

Sed ĉar homo rifuzas esti heredanto, li estas kondamnita al infero de liberala tutmondiĝo, en kiu kunpuŝiĝas intereso de la unuopulo kun la alia sen kiu ajn leĝo ol estas profito kaj prezo.

Sed en tiu ĉi libro mi volas prezenti al la okcidenta homo, ke la vera kaŭzo de la rifuzo de la heredaĵo kaj patreco estas rifuzo de Dio. Mi vidas, ke en la profundo de la koro de la okcidenta homo estas fundamenta rifuzo de la kreinta patreco de Dio. Ni akceptis nian naturecon kiel viro kaj virino. „Dio kreis homon laŭ sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin, en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.“ (Gen 1,27) Tio ĉi estas neakceptebla por moderna menso. La gender-ideologio estas rifuzo akcepti seksan naturecon doni-

tan de Dio. Tial iuj en la Okcidento rezistas, ribelas kaj batalas kontraŭ Dio. Ili rezistas al sia Patro kaj Kreinto kun levita kapo kaj sencele ili sin kripligas por ŝanĝi sian seksecon. Sed fakte ili nenion esencan ŝanĝas el sia vireco aŭ virineco. Fakte ili sian revoltantan opozicion kaj ribelon kontraŭ Dio per radikala maniero demonstras sur sia korpo. La modernan filozofion kaj modernan spiriton ili perforte rifuzas atakante la naturan leĝon; kiel diras la sankta Johano: „Ĉiu, kiu faras pekon, faras ion kontraŭ la leĝo; kaj peko estas kontraŭleĝeco." (1 Joh 3,4) Neigado de la natura leĝo estas ekstrema rifuzo de Dio, per proklamo de la senlima libereco kiel absoluta valoro kaj pravigo por peko. La gender-ideologio estas perfekta ekzemplo de tio.

La Okcidento rifuzas akcepti (donacon) kaj agnoskas nur tion, kion ĝi mem kreis. Transhumanismo estas lasta etapo de tiu ĉi movado. Ĉar la homa natureco estas donaco de Dio, ĝi iĝas netolerebla por la okcidenta homo. Tiu ĉi ribelo havas spiritan bazon. Estas tio ribelo de Satano kontraŭ donaco de la graco.

Principe mi estas konvinkita, ke la homo de Okcidento rifuzas esti savita pere de la graco de Dio. Li rifuzas akcepti savon volante mem ĝin konstrui. „La fundamentaj valoraĵoj" kreitaj fare de UNO baziĝas sur rifuzo de Dio, kiujn mi komparas al la riĉa junulo el evangelio. Dio kun amo rigardis la Okcidenton, ĉar ĝi kreis multajn bonaĵojn. Li instigis ĝin pluen iri, sed la Okcidento sin forturnis de Li. Ĝi preferis riĉaĵon, kiun ĝi havas.

La belegaj katedraloj en la Okcidento povis esti kreitaj nur fare de homoj kun la firma kredo kaj granda humileco, kiuj vere ĝojis pro la konscio, ke ili estas la filoj de Dio. Ili estas kvazaŭ la kanto de ĝojo, ili estas himno gloriganta Dion, skulptita en la ŝtonon kaj vitraloj. Ili estas verko de filoj, kiuj amas kaj adoras Patron! Ĉiuj ŝatis, povante skulpti en la ŝtonon sian kredon kaj amon al Dio kaj ne sian propran nomon. La artverkoj estis kreitaj por honoro kaj gloro de Dio mem. La moderna homo de la Okcidento estas tro malĝoja por atingi tian verkon.

Li decidis esti soleca orfo: kiel li povas perkante glori la ĉielan Patron, de kiu li ĉion ricevis? Kion li do faros? Ĉe la detruita katedralo Notre-Dame iuj aŭdacis diri: tiu ĉi konstruaĵo jam finservis, ni konstruu ion novan, pli modernan. Ni konstruu ion laŭ nia propra bildo! La konstruaĵon, kiu ne parolas pri la gloro de Dio, sed kiu glorigas homon, forton de scienco kaj moderneco.

Same tiel, iuj homoj rigardos la hodiaŭan katolikan eklezion dirante: tiu ĉi Eklezio jam sian celon plenumis, ni konstruu novan eklezion laŭ nia propra bildo. Ili opinias: La Eklezio ne plu estas fidinda, ne plu ni aŭdas ĝian voĉon en la amaskomunikiloj. Ĝi estas tro difektita fare de skandaloj de pedofilio kaj samseksemeco inter la pastroj. Jam multaj pastroj estas malboniĝintaj. Estas necese ĝin ŝanĝi, fondi la eklezion novan.

La pastra celibato estas tro malfacila por hodiaŭa tempo: Ni ĝin faru libervola! La morala instruo de la evangelio estas tro postulema: ni simpligu ĝin! Ni diluu ĝin kun relativismo kaj neglekteco. Estonte ni pli multe zorgu pri la socialaj aferoj.

Ĉu la katolika kredo estas nekonvena por la amaskomunikiloj? Ni ĝin ŝanĝu! Ni ĝin ŝanĝu laŭ mentaleco kaj morala perverseco de la hodiaŭa tempo. Ni akceptu novajn tutmondecajn etikajn principojn proklamitajn fare de UNO kaj la gender-ideologio!

Ni faru Eklezion homecan kaj horizontalan socion, ni permesu al ĝi paroli per lingvo akceptebla por amaskomunikiloj, ni faru ĝin populara! Miaj geamikoj, tia Eklezio neniun alparolos. Miaj karaj geamikoj, la mondo ne bezonas Eklezion, kiu proponas nenion alian ol reflekton de sia propra bildo!

La Eklezio allogas tial, ĉar ĝi ebligas al ni renkontiĝi kun Jesuo. Ĝi estas vera Eklezio, ĉar ĝi transdonas al ni Dian rivelon. Se la Eklezio estas tro ŝarĝita nur per homaj aferoj, ĝi malhelpas al la Dia lumo lumi interne de ĝi kaj pere de ĝi. La Eklezio devus esti

kiel katedralo. Ĉio en ĝi devus laŭdi Dian gloron. Senĉese devas niaj rigardoj celi al Li, kiel la turo de la katedralo Notre-Dame montradis al ĉielo.

Miaj karaj geamikoj, ni devas renovigi katedralon. Ni devas ĝin renovigi precize tian, kia ĝi estis. Ni ne bezonas krei novan eklezion. Ni mem devas konvertiĝi, por ke la Eklezio povu lumi ankoraŭ pli multe, por ke la Eklezio denove estu katedralo, kiu laŭdas Dian gloron kaj kondukas la popolon al Dio. ■

El www.catholicworldreport.com/2019/06/21 kun alrigardo al *www.evangelium-vitae* (24.6.2019)

**Rimarkoj:**

(1) Evangelium Vitae, 25.3.1955, alineo 21.

(2) Nikolaj Berdjajev, La nova mezepoko, Parizo, 1927.

## I.K.U.E. DUM LA 104-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZINTA EN LAHTIO, FINNLANDO

La finna urbo Lahtio (Lahti) gastigis nunjare inter la 20-a kaj la 27-a de julio la 104-an Universalan Kongreson de Esperanto. La ĉefa temo de la kongreso estis: „Vivanta naturo – floranta kulturo“.




Kiel kutime, ankaŭ IKUE aktive partoprenis. Dum la unua tago IKUE kaj E-elsendo de Radio Vatikana prezentiĝis per budo okaze de la Movada foiro.





Dum la dimanĉa posttagmezo okazis la kunsido de la membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj Kristana Esperantista Ligo Internacia.



*Pastoro Leif Nordenstorm el Svedio*

La kunsidon gvidis la prezidantino de IKUE Marija Belošević. Ŝi prezentis la agadon de IKUE kaj KELI, kun aparta atento pri





*La preĝejo Rustinkirkko*

la pasintjara 22-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Poděbrady (Ĉeĥio). La ĉeestantoj havis eblecon ankaŭ aŭdi novaĵojn ĉefe pri IKUE, kiu nun estas survoje al la jubilea 110-jariĝo.

Estis prezentitaj ankaŭ planoj por la ekumena diservo dum la venontjara UK en Montrealo, Kanado, kaj plano de IKUE okazigi kelktagan renkontiĝon por katolikaj esperantistoj kaj la esperantlingvajn mescelebrojn.

Ĉe la fino de la kunsido oni ekzercis kantojn por la ekumena diservo, kiu okazis vendredon posttagmeze en la preĝejo Rustinkirkko. La diservon prezidis pastoro Leif Nordenstorm el Svedio. La kantadon dum la diservo en la gastiganta preĝejo per orgenludo akompanis tiea orgenludantino, kiu post la diservo prezentis etan koncerton.

Dum la UK la prezidantino de IKUE aktive partoprenis en la Faka Forumo, kaj same ŝi ĉeestis la kunsidon de radio-aŭskultantoj. ■

*Marija Belošević*
*(aŭtorino ankaŭ de fotoj)*

## KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA KONGRESIS ĈE LA LAGO BALATONO EN HUNGARIO

Nunjara la 69-a kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) okazis dum la tagoj de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 2019 en Révfülöp (Hungario).

La kongresejo estis la moderna konferenca kaj eduka centro de la hungara luterana eklezio ĉe la lago Balatono.



Lige al la ĉeftemo de la kongreso „… mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.” (Mat 25,35) okazis kelkaj prelegoj kaj dum unu tago ĉeestis gaste ankaŭ la reprezentantoj de Helsinki-komitato el Budapeŝto. Tio donis la okazon ne nur aŭdi la strebojn de la civilaj asocioj en Hungario rilate la migrantojn, sed ankaŭ interŝanĝi spertojn pri la temo kun la partoprenantoj el Ĉeĥio, Francio kaj Kroatio.

Krom la ĉiutagaj maten- kaj vesper-preĝoj, la programo estis pliriĉigita per la ĉiutagaj bibliaj rondoj.

La kongresanoj ankaŭ ekskursis al la fama kastelo Keszthely kaj al Tapolca.

Krom KELI-anoj, la kongreson partoprenis ankaŭ kelkaj IKUE-anoj, i.a. parte la prezidantino *Marija Belošević.* ■

# LA SANKTA MESO OKAZE DE LA 86-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

La urbo Triesto gastigis ĉi-jaran 86-an Italan Kongreson de Esperanto inter la 24-a kaj la 31-a de aŭgusto. Ĉefa temo de la kongreso estis „ Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ“.



La duan kongresan tagon, la 25-an de aŭgusto en la preĝejo de la Beata Virgulino de la Rozario okazis la sankta meso, kiun laŭ la invito de la lokaj organizantoj, t.e. Triesta Esperanto-Asocio prizorgis Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

La ĉefcelebranto estis profesoro de la teologia fakultato el Ljubljana (Slovenio) d-ro Matjaž Celarc. Por li tio estis la unua okazo celebri la meson en Esperanto. Surloke al la kuncelebrado aliĝis la pola pastro Kazimierz Noculak. Pro la malsano forestis antaŭanoncita kroata pastro Ivica Jurišić.

La IKUE-anoj Krešimir Belošević kaj Norma Cescotti gvidis la kantadon. Fine de la meso la dankvortojn eldiris la prezidantino de IKUE Marija Belošević.

Al la Kongreso la salutmesaĝon nome de la Itala IKUE-sekcio – UECI sendis ĝia prezidantino Tiziana Fossati.

Al la kongresa programo kontribuis kelkaj IKUE-anoj. Kadre de la „Seminario Leonardo“ prelegis Krešimir kaj Marija Belošević pri „Faust Vrančić – la kroata Leonardo“. Vrančić estis la kroata erudito, sciencisto, verkisto, leksikografo, sed ankaŭ sacerdoto kaj episkopo, kiu agis en diversaj urboj de Mezeŭropo kaj Romo kaj Venecio.

Al la kongresanoj estis proponitaj ankaŭ



diversaj ekskursoj. Ĉiuj tuttagaj havis enprogramitajn vizitojn ankaŭ de la lokaj preĝejoj. Krome, en Triesto mem unu duontaga ekskurso celis konigi diverskultajn preĝejojn, la bazilikon de sankta Antonio, serbo-ortodoksan preĝejon, orient-grekan preĝejon kaj sinagogon.

Kadre de la postkongreso okazis vizito de la ĉemara urbeto Grado kaj insuleto Barbana, kie troviĝas fama Maria pilgrimejo. Sur la insulo ankaŭ troviĝas la tombo de la diservanto Egidio Bullesi (Egidije Bulešić, 1905 – 1929). ■

*Marija Belošević*

## LA OKULTISMO REVENAS PLI FORTA OL ANTAŬE

En la papa unversitato Regina Apostolorum antaŭ nelonge okazis kurso pri ekzorcismo kaj preĝo por liberigo. Celo de la seminario estis proponado de plua formacio al pastroj, kiujn la diocezaj episkopoj komisiis al farado de ekzorcismoj. Pri enhavo de la nunjara kurso parolis iniciatinto de tiu ĉi projekto komencita jam en la jaro 2004, profesoro Giuseppe Ferraris:



„La kurso estas en sia karaktero multdisciplina. Ĝi tuŝas multajn temojn kaj ekzorcismo estas en ĝi rigardata el diversaj vidpunktoj. Sur unu flanko estas vidpunktoj eklezíaj, teologiaj, bibliaj, liturgiaj, katehetikaj aŭ kanonikaj kaj sur la dua medicinaj kaj psikologiaj, juraj kaj kriminologiaj, farmakologiaj kaj pluaj. Estas proponata al la frekventantoj tre larĝa preparo.“

En nuntempa sekularigita socio ni ĉiam pli ofte aŭdas pri allogiteco de okultismo...

„La socio havis dum certa tempo tendencon la ideon pri demono forgesadi, ne paroli pri diablo, opinii lin kiel io, kio apartenas nur inter superstiĉojn. Sed dum jaroj tiu ĉi fenomeno disvastiĝis kaj nekredeble elkreskis. Ĉiukaze multaj nuntempaj homoj okupiĝas pri la demandoj ligitaj kun okultismo kaj kun satanismo. Ŝajnis, ke ĝi malaperis, sed nun ĝi revenas pli forta ol antaŭe. Novan intereson pri demono dokumentas ankaŭ reago de tiu ĉi kurso en amaskomunikiloj. Komencante per la unua kurso, ĉiuj plej gravaj amaskonunikiloj pri ĝi raportis. Iliaj reprezentantoj ĉi tie kolektiĝis el ĉiuj kontinentoj, kaj eĉ estis kreita filmo inspirita per tiu ĉi kurso. La filmo Rito *(The Rite 2011)* estas inspirita per romano verkita de Matte Beglie, kiu partoprenis en unu el la unuaj kursoj. Komence neniu volis paroli pri demono, nek protestanta, nek katolika teologioj. Multaj pastroj troviĝis en malfacilaĵoj, ĉar en teologiaj fakultatoj okazadis neniuj seminarioj kaj ili ne sciis, kiel sin al tiuj ĉi problemoj alfronti. Alvenadis al ili kredantoj kun timzorgoj pri siaj parencoj, kiuj enplektiĝis en



strangajn grupojn aŭ sentis sin obseditaj fare de demono kaj pastroj tute ne sciis, kion fari. De tie ankaŭ ekestis ideo de tiu ĉi kurso. Ni volas doni helpeman manon al sacerdotoj, formadi ilin, ke ili sciu, kiel en tiu ĉi kampo ĝuste moviĝi,“ diris Giuseppe Ferraris. ■

Fonto: www.radiovaticana.cz

# OFENSIVO DE SATANO

Abbé René Laurentin

***Fino de la 19-a jc. kaj la unua duono de la 20-a jc. mirinde al ni demonstras taktikon de la malbona spirito; ĝi estas la taktiko, kiun profete priskribis Ch. Baudelaire: La plej arogantaj ruzaĵoj konsistas en tio, ke li nin konvinkigas pri sia neekzistado. Tiun ĉi citaĵon de Baudelaire memorigis ripete Johano Paŭlo la Dua.***

Ni do estas atestantoj de du fenomenoj, kiuj ĉiam pli disvastiĝas: antaŭ ĉio temas pri interveno en kulturajn, socialajn kaj politikajn strukturojn, poste danke al sukceso de tiu ĉi kaŝita agado eliĝas sur la surfacon malfermite satanecaj kultoj, ofte en provoka simileco, kiuj formas medion, el kiu estis forigita ĉio sankteca. Tiuj ĉi satanecaj kultoj ĉiam pli disvastiĝas inter la junularo.

Ni do travivas:

- kaŝitan kaj strukturan efikadon de la Malbonulo,
- lian elmergiĝon kun malkovrita vizaĝo en nia jarcento, ĉe kio oni ne forgesu, ke tiu ĉi malfermita manifestado havas tute anoniman dimension kaj realiĝas per anonima infiltrado.

### Struktura akiro de potenco

Sukceso de Satano en la nuna epoko konsistas en tio, ke li anstataŭis sian senperan agadon, kiu kaŭzas timon pri diablo, per alia, anonima, nevidebla kaj trankviliga agado, kiu enpenetras senbrue ĉiam pli en socialan medion, sen porti la sigelon „reganto de tiu ĉi mondo“, ĉar li uzas homajn „agentojn“, kiuj aktivas sur strategie gravaj lokoj. Tio do aspektas tiel, kvazaŭ li transprenus stilon de diskreta ĝenerala direktoro, kiu tenas en la mano ĉiujn ŝnuretojn, sen bezono mem vidigi sin publike.

Tiu ĉi metamorfozo efektiviĝis tre rapide kaj efike. La homa socio estis religieca kaj antaŭ ĉio kristaneca. Intertempe ĝi fariĝis tiom sekulara kaj laikeca, ĝis la nesubpremada bezono de la religio tute renversiĝis, ĝis ofte ĝi eliĝis en memmortigajn kaj rekte satanecajn sektojn.



*Abbé René Laurentin*

### Eligo de Dio

La moderna historio de la civilizacio baziĝas en eligo de Dio kaj ekzalteco de la homo.

Ekde la tempo de renesanco progresas anstataŭigo de humanismo per deismo, kiu transformiĝis je racionalismo de filozofoj de la 18-a jc. kaj sekve poste je marksisma ateismo de la 19-a jc., kiu trovis sian daŭrigon en ekonomia materialismo. Ambaŭ nur malmulte diferenciĝas, kiel diras Chesterton. La tento de la hereda peko, kiu ricevis aspekton de bela mito, akiris en la nuna tempo tute konkretan formon: La homo sin devas liberigi de Dio. Ĝi proklamis ĉion transcendan kiel subpremantan diktaturon kaj samtempe kiel trompan bildon, kiun oni devas forigi. Dio, la Kreinto kaj fonto de ĉio bona, estis proklamita kiel tirano, kiu devas esti eligita el la konscio de la homo, kie Li estas respondeca pri ekesto de turmentantaj pensoj. La dankado devas cedi al malfido; la konsento al revolto; la infaneca amo al malamo; la kredo al rifuzo; „Vivu Dio“ al devizo „Morton al Dio!“; humileco al fiereco de la venka emancipo.

Post agresiva fazo de revolto, kiu signis la 19-an kaj la komencon de la 20-a jarcentoj, iĝis la faligita Dio en konscio de la homoj Granda Forestanto. Militantan ateismon de iuj grupoj anstataŭis agnosticismo, kiu estas tre disvastigita. Antaŭe ĝin konfesis ĉirkaŭe 250 milionoj, en la jaro 2000 ĉirkaŭe unu miliardo. Subtilaj meĥanismoj de diabla tento, kiujn al ni malkaŝas libro Genezo (Gen 3,3-5), denove ekvivis en la moderna konscio. Dio diris al vi: Ne manĝu el la arbo de sciado, por ke vi ne mortu, sed tio estas lia finto por malhelpi vin esti kiel Dio mastroj super la mondo kaj ekkonadi bonon kaj malbonon. Puberta, per siaj progresoj ebriiĝinta homaro de la 19-a jc. en tio trovis grandan ŝaton: Homo! Rigardu, nun vi elkreskis kaj baldaŭ vi estos mastro de tiu ĉi mondo. Vi havas scion. Vi ne bezonas Dion kaj lian providencon. La progreso kaj tekniko superos malriĉecon, malsanojn, militon kaj eble eĉ la morton. Dio volas vin teni en sklaveco, sed vi estas maturaj por libereco. Ja eĉ pli: Dio tute ne ekzistas. Vi povas senpune decidadi pri lia morto. Vi mem estas dio de la estonteco. Tion ĉion – ne sen troigo – heroldis diablo pere de marksismo kaj kredo je scienco en la 19-a jarcento. Ĝi estis profetaĵo de la nova feliĉo, kiu devus ekstari sur ruinoj de la superita kristanismo kaj ĝia morta Dio.

La scienco estis certa, ke ĝi pruvos verecon de la ateismo: Estas neniu kreinto, evolucio estas pli ol kreado. La progreso de la homo postulas falon de Dio. La disvolviĝo de la moderneco surprize sin turnis kontraŭ Dio, por ke ĝi povu agi prospere de la homo: prospere de lia aŭtonomio kaj kontraŭ Dia transcendo. Sed ĉi ĉio kondukis de liberalaj eŭforioj ĝis disreviĝoj kaj ofte ĝis malespero. La progreso superis nek malriĉecon, nek malsaton, nek militon, malsanon aŭ morton, male en multaj direktoj ilin ankoraŭ pli disvastigis. La homo, kiu forgesis pri sia deveno kaj sia dia destino, falis en absurdecon. Lia civilizacio fariĝis civilizacio de timo, en kiu trankviligaĵoj kaj drogoj iĝis lia ĉiutaga pano. La homo sen Dio estas totale elreligita, li havas neniun bazon de la vivo kaj neniun estontecon.

La valoroj, kiujn kreis tiu ĉi civilizacio, devus anstataŭi elanon fontantan el Dio. Ili anstataŭis Lin. Ili sin turnis kontraŭ kreitaĵoj. La ĉefa produktado sur ĉi tiu planedo estas produktado de mortigaj armiloj. Drogoj fariĝis monda superpotenco: ili vivtenas mafiojn, Fajran Ĉevalon kaj aliajn organizojn. Por Kolumbio estas drogoj la ĉefa kaj la plej granda industria faktoro. Ja eĉ la amo, reduktita je nura sekso, sin orientiĝis al morto: ununura zorgo estas, kiel travivi ĝuon, sen ebleco de koncipo, kaj se kun koncipo, do sen ebleco de nasko. Legaligo de abortigoj, ofte subvenciataj, kulpas pro pli granda nombro da mortintoj ol koncentrejoj kaj gulagoj entute.

En ĉiuj ĉi trajtoj, konfliktoj, fiaskoj kaj vojo en kaoson estas eble tute klare distingi realismon de Satano, kiu surprenas aspekton de diversvariaj impetegaj grupoj: mediaj, komercaj, publikaj kaj ofte eĉ leĝaj strukturoj disvastigas nelimigite en la tuta mondo tiom da tentoj, ke Satano tute ne devas penadi kaj manaĝi. La potencaj „impetegaj grupoj“ efike subtenas tiun ĉi evoluon direktantan al apokalipsa fino.

Ĉu ne apartenas al agado de Satano ankaŭ novtempa disvastiĝo de islamo, kiu larĝe superas disvastiĝon de kristanismo kaj kiu kun si alportas ĉiam pli aktivan kaj konsternigan konekton de rekte furiozanta fanatismo kaj religio, kaj religion, kiu eĉ kultas la saman Dion de la Biblio?

La genieco de Satano baziĝas en tio, kiel li dum duonjarcento disvastigadis en la Oriento praktikan kaj en la Okcidento ekonomian materialismon. Respondo al tio estas kreskeganta „sovaĝa religieco“ en formo de novaj sektoj, inkluzive de satanistaj. En tiu ĉi horo de la sukceso jam povas do Satano eliri el ombro de kaŝeco kaj lasi publike ovacii sin kaj la pekon. ■

*Laŭ libro: Le démon: mythe ou réalité?*

# Sankta Seĝo: GENDER-IDEOLOGIO POR LA HOMARO SIGNIFAS PAŜON RETURNEN

La reprezentanto de Vatikano en oficejoj de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko prezentis sintenon de Vatikano koncerne la gender-ideologio. Li memorigis vortojn de la papo Francisko: „Ni volas neniun diskriminacii, sed temas pri danĝero por la homaro“.



*La ĉefepiskopo Bernardito Auza - la konstanta observanto de la Sankta Seĝo*

La ĉefepiskopo Bernardito Auza uzis fortajn vortojn. Kiel konstanta observanto de la Sankta Seĝo ĉe UNO en Novjorko li memorigis klaran sintenon de la papo Francisko koncerne la gender-ideologio. La vatikana diplomato partoprenis renkontiĝon titolitan „Egaleco de sekso kaj gender-ideologio, protekti virinojn kaj knabinojn“. La celo de la aranĝo estis atentigi pri la situacio de la virinoj en la mondo kaj monitori kompetentajn politikajn, ekonomiajn, civitanajn kaj socialajn aferojn de la virinoj. „Iam“ – diris la ĉefepiskopo Auza – „estis klara kompreno de tio, kion signifas esti virino, tio estis afero de ĥromosomoj. Nuntempe estis tiu ĉi evidentaĵo difektita per gender-ideologio, kiu postulas homan identecon sendependan de la sekso.“

„Anstataŭo de biologia sekso per tiu ĉi gender-identeco“ – daŭrigis la vatikana reprezentanto – „kaŭzas gravajn sekvojn ne nur en la fako de juro, eduko, ekonomio, sano, sekuro, sporto, lingvo kaj kulturo, sed ankaŭ rilate al antropologio, homa digneco, homrajtoj, geedzeco kaj familio, gepatreco, kaj grave ĝi tuŝas sortojn de la virinoj, viroj kaj antaŭ ĉio de la infanoj. La papo Francisko“ – memorigis la Mons. Auza – „estas emfaza defendanto de la digneco kaj rajto »ne esti diskriminaciita« rilate al tiuj, kiuj ne sentas sin reprezentitaj per sia biologia sekso, sed samtempe li parolas tre klare pri la danĝero de la gender-ideologio por la unuopuloj kaj la socio.“

La vatikana diplomato citis la 56-an paragrafon de la apostola ekshortigo Amoris Laetitia, en kiu la papo emfazas, ke la gender-ideologio neganta la naturan reciprokecon de viro kaj virino, direktas al socio sen la seksaj diferencoj kaj malplenigas antropologian bazon de la familio. „Tiu ĉi ideologio enkondukas edukajn projektojn kaj leĝodonan reguligon, kiuj validigas identecon de la personoj kaj la sentan intimecon al la absoluta liberiĝo el la biologia diferenco inter la viro kaj virino. La homa identeco estas lasata al la individua elekto, kiu eĉ povas dumtempe ŝanĝiĝi. Estas maltrankvilige, ke iuj ideologioj de tiu ĉi speco pretendas respondi al certaj, iam kompreneblaj aspiroj, strebante validigi kiel unuforman pensadon, kiu devas influadi ankaŭ edukadon de la infanoj. Ne estas necese ignori, ke la »biologia sekso kaj sociale-kultura rolo de la sekso (gender) povas diferenciĝi, same kiel animo kaj korpo, sed ne apartigadi«. Duaflanke, la »bioteknika revolucio en la kampo de generado de la homo ebligis manipuladi pri la akto de generado kaj fari ĝin sendependa al la seksa kuniĝo inter la viro kaj virino. La homa vivo kaj kapablo naskadi tiel iĝis »konstrukesta« afero subigita antaŭ ĉio al la deziro de unuopuloj eĉ duopoj. La unua afero estas ekkompreni homan subtilecon aŭ komplikecon

de la vivo, la dua afero estas akceptadi ideologiojn, kiuj apartigas du neapartigeblajn aspektojn de realeco. Ni ne enfalu en la pekan pretendon anstataŭi Kreinton. Ni estas kreituloj, ni ne estas ĉiopotenculoj. La kreo nin antaŭigas kaj ĝi devas esti akceptita kiel donaco." Kaj la citaĵo el ekshortigo Amoris Laetitia finiĝas per la vortoj: „Samtempe ni estas kompetentaj gardi nian homecon kaj tio signifas antaŭ ĉio akcepti ĝin kaj ĝin respekti tiel, kiel ĝi estis kreita."

La papa reprezentanto memorigis ankaŭ la vortojn de la encikliko Laudato si, en kiu la papo en la paragrafo 155 parolas pri akcepto de la propra korpo, kio estas antaŭkondiĉo al tio, ke ni akceptadu tutan mondon kiel donacon kaj bazon de la homa ekologio. Pri komplementeco de la viro kaj la virino parolis la papo ankaŭ en la alparolo al episkopoj de Porto-Riko, la 8-an de junio 2015, al kiuj li eksplikis, ke la malsameco de la sekseco estas nenio, kion oni devus negi, por vivi pli libere kaj pli juste, nek la rimedo de konflikto aŭ subordigiteco, sed ĝi estas donita al homo por komuneco kaj generado. Dum la ĝenerala aŭdienco la 15-an de aprilo 2015 la papo indikis strebadon de la propagandistoj de la gender-ideologio kiel „paŝon returnen", ĉar „forigo de la seksa diferenteco kaŭzas fakte problemon kaj ne solvon."

„Se ni dubigos la naturan duecon kaj komplementecon de la viro kaj virino" – rimarkigis plue la ĉefepiskopo Auza – „per tio estas minacita mem la koncepto de la homa estulo. La korpo ĉesas esti karakteriza trajto de la homo, kiu estas reduktita je spirito kaj volo. La homa estaĵo tiel fariĝas preskaŭ abstraktaĵo. La papo Francisko" – memorigis plu la vatikana diplomato – „estas maltrankviligita precipe per instruo de la gender-ideologio en lernejoj, dum kiu estas infanoj ekde la plej juna aĝo instigitaj al duboj pri sia ekzistado, pri sia identeco kiel knabo aŭ knabino kaj estas proponita al ili opinio, ke »la sekson oni povas por si elekti«. Konklude la ĉefepiskopo Auza citis papan alparolon al polaj episkopoj (el la 27-a de julio 2016). Li tiam metis al si demandon „Kial oni tion instruas?" kaj li respondis kun tio, ke interesiĝintaj estas institucioj, kiuj pagas lernolibrojn. „Ili estas ideologiaj koloniigantoj, subtenataj per tre infludonaj landoj", ankaŭ en tiuj ŝtatoj kaj kulturoj, kie oni ne konsentas pri tiu ĉi nova kaj radikala antropologio. ■

*La 21-an de marto 2019, Vatican News*

## PRO ĈIO ĈI KULPAS VI, MALJUNULINO...

*Tiun ĉi spritaĵon mi tre ŝatas. Ĝi estas ne nur por ekrido, sed ankaŭ por enpensiĝo:*

Maljunaj geedzoj eniris ĉielon. Pro tio, kio ilin tie atendis, ili estis ege surprizitaj – estis tio ankoraŭ miloble pli bona, ol ili tion al si dum la surtera vivo imagis. Kaj ju pli ili pro tio miregis, des pli la maljunulino estis ĉiam pli ekzaltita kaj maljunulo pli kaj pli malĝoja – ĝis li eksploregis.

La maljunulino lin puŝbatis dirante: „Nu do, maljunulo, ne ploru! Ni ja estas en la ĉielo kaj ĉio ĉi tie estas miloble pli bona, ol ni dum nia surtera vivo tion imagis...!

„Pro ĉi ĉio kulpas vi, maljunulino," diris inter apartaj plorĝemoj maljunulo. „Tio senĉese estis: prenu koltukon, manĝu vitaminojn, iru al kuracisto, ne kuŝu nur sur kuŝsofo, vi devas moviĝi... – Pro ĉi ĉio kulpas vi! Ni ja povis esti ĉi tie dudek jarojn pli frue!"


Ĉu vi ekridis? Kaj ĉu vi enpensiĝis? Kiel serioze ni traktas vortojn de la Sankta Skribo: „Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas." (1 Kor 2,9) Ĉu estas por ni eterneco kun Dio – la ĉielo – vere la ĉefa celo, de kiu dependas ĉiuj niaj gravaj decidoj? Ĉu ni scias, ke „surtere ni estas tial, por ke ni ekkonadu kaj amu Dion, por ke ni laŭ lia volo faru bonon kaj ke ni iun tagon eniru ĉielon"? ■

*Sac. Pavel Zahradníček OMI*

# HO DIPATRINO

(Ó Matko Páně)

Muziko kaj vortoj de Josef Julínek, 1943 Tradukis Jiří Kořínek




2. Venu kun mi tra hejma region´ / kun bonodoro flora, / min akompanu el gepatra dom´, / gvidu tra l´ mondo fora, / am-bril´ Vi estu en animmalhel´, / estu en tuta viv´ por ni model´. / Maria, Maria, Maria.

3. Venu tra mia kara patroland´, / Vin rememoras tie / jar-centojn laŭdoj de l´ fidelaj kant´, / preĝoj Vin celas pie. / Al Vi kun amo turnas sin popol´, / koroj kredantaj venas por konsol´. / Maria, Maria, Maria.

4. Venu en horo, kiam fuĝas viv´, / triston el koroj prenu, / redonu amon, kiun rompis rif´, / preĝvojon mian benu, / helpu malsanajn grace en sufer´, / ben´ via akompanu nin sur ter´. / Maria, Maria, Maria.

5. Savu la mortajn de turmento-flam´, / aŭdu al pet´ ardega, / havas kompaton via pura am´ / kun la animo peka. / Miajn dolorojn, petojn konas Vi, / ne vanos mia preĝ´ al Vi kaj Di´. / Maria, Maria, Maria.

6. Florbrilo blanka ravas en girland´ / super sanktejo via, / en tuta mond´, en ĉiu fora land´, / Sankta Patrino Dia, / batas tenere koroj en fidel´ / por Vi, Reĝino virga de l´ ĉiel´. / Maria, Maria, Maria.

